

29a ORDINARA DIMANĈO – 16a de oktobro 2016

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

DIO FAROS LAŬ JUSTECO POR SIAJ ELEKTITOJ, KIUJ ALVOKAS LIN.

El la evangelio laŭ Luko 18, 1-8

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj parabolon, por instrui kiel oni devas ĉiam preĝi kaj ne laciĝi. Li diris: „En iu urbo estis juĝisto, kiu neniun respektis: nek Dion, nek homojn. En tiu sama urbo estis ankaŭ vidvino. Ŝi iradis al tiu juĝisto insiste petante: ‚Faru por mi laŭ justeco kontraŭ mia malamiko!‘ Dum kelka tempo la juĝisto ne volis interveni; sed fine li pensis: ‚Kvankam mi neniel timas Dion nek zorgas pri homoj, tamen mi agos laŭ justeco por ĉi tiu vidvino, por ke ŝi ne plu ĝenu kaj turmentu min.‘” Poste la Sinjoro aldonis: „Vi aŭdis, kion diris la maljusta juĝisto. Nu, ĉu Dio ne faros laŭ justeco por siaj elektitoj, kiuj tage kaj nokte vokas Lin? Ĉu Li longe atendigos ilin? Mi diras al vi: Rapide Li agos por ili laŭ justeco! Tamen, kiam venos la Filo de la homo, ĉu Li trovos ankoraŭ kredon sur la tero?”

Ĉi tiu ĉapitro de Luko komenciĝas per instruo de Jesuo ne pri preĝado, sed pri kredo. Ne temas pri insista preĝado, sed pri kredo. Kion signifas kredo? Fidi ĝisfunde, ke Dio realigas sian projekton. Kio estas la projekto de Dio? Lia regno. Pri preĝado Jesuo jam parolis al siaj disĉiploj: Li prezentis Dion kiel Patron, kiu zorgas por la bono de siaj filoj, kiel Patron, kiu ne iras renkonte al iliaj bezonoj, iliaj necesoj, sed eĉ ilin antaŭsentas, kaj estus superflue ilin memori. Sian predikon pri preĝado li konkludis dirante; *‘Via Patro scias, ke vi tion bezonas. Sed celu lian regnon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi’* Lk 12, 30-31).

Do por la regno oni preĝas. Kaj tion konfirmas la teksto de la Patro Nia *‘Venu via regno’* (Lk 11, 3). Kio estas la regno? Anstataŭa socio. Ni memoru

tion, legante la hodiaŭan ĉapitron: *"En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj... (do la parabolo estas por la disĉiploj, kiuj ne montris fidon en la realiĝo de tiuj promesoj; parabolon, por instrui kiel oni devas ĉiam preĝi kaj ne laciĝi: laciĝo kaptas la homojn ne kredantajn. Li diris: „'En iu urbo estis juĝisto, kiu neniun respektis: nek Dion, nek homojn.*

En tiu sama urbo estis ankaŭ vidvino. Ŝi iradis al tiu juĝisto insiste petante: „Faru por mi laŭ justeco kontraŭ mia malamiko!"." "Poste la Sinjoro aldonis: *„Vi aŭdis, kion diris la maljusta juĝisto. Nu, "ĉu Dio ne faros laŭ justeco por siaj elektitoj, kiuj tage kaj nokte vokas Lin? Ĉu Li longe atendigos ilin? Mi diras al vi: Rapide Li agos por ili laŭ justeco! Tamen, kiam venos la Filo de la homo, ĉu Li trovos ankoraŭ kredon sur la tero?"* Unuavide ŝajnus, ke oni preĝu iun Dion surdan kaj neatenteman. Sed tiu estas la Dio de la paganoj, ne la Patro de Jesuo.

Ĉi tie Jesuo asertas, ke la promesoj de Dio realiĝas, kvankam tion oni ne tuj perceptas, kaj la instruado ne estas pri preĝado (kio estas rimedo), sed pri justeco (kiu estas la celo).

Kaj kvarfoje aperas vorto "justeco" en la hodiaŭa evangelio. Tiu estas la justeco de la regno, de la anstataŭa socio proponata de Jesuo.

En la parabolon envenas rolanto: " : *„En iu urbo estis juĝisto, kiu neniun respektis: nek Dion, nek homojn."* Li estas potenculo, fierulo. Kaj tiuj vortoj memorigas al ni la anoncon de Maria je la komenco de ĉi tiu evangelio, la kanton pri la projekto de Dio por siaj kreitaĵoj, projekto realigebla nur per kunhelpo de la homoj: *"Li dispelis fierulojn,...Li malaltigis potenculojn,... Li altigis humilulojn,...malsatulojn... Li plenigis per bonaĵo, ...kaj riĉulojn li forsendis malplenaj"* (Lk, 3-53). Tiu anonco estas la projekto de Dio. Tiun projekton Jesuo emfazas. Tion la disĉiploj devas fidi. Por tiu kredo ili devas kunhelpi; alikaze ĝi ne realiĝas.

"En tiu sama urbo estis ankaŭ vidvino. (en la Biblio la vidvinoj, ĉar ne vivtenataj de iu viro, estas senhelpaj, senprotektaj, senrimedaj. Tial Dio en la Biblio estas "la defendanto de la vidvinoj"). "Ŝi iradis al tiu juĝisto insiste petante: „Faru por mi laŭ justeco kontraŭ mia malamiko!".

En ĉi tiu parabolo Luko plurfoje mencias justecon: ĉi tiu estas la unua fojo, sekvos aliaj tri. *"Dum kelka tempo la juĝisto ne volis interveni; sed fine li pensis: „Kvankam mi neniel timas Dion (pri tio li konscias) nek zorgas pri homoj (eĉ ne pri tiuj, kiuj rajtas ricevi mian helpon), tamen mi agos laŭ justeco por ĉi tiu vidvino, por ke ŝi ne plu misfamigu min"*.

Nun Jesuo rekondukas nin al la ĉeftemo: "*Poste la Sinjoro aldonis: „Vi aŭdis (la parabolo estas instruo por la disĉiploj), kion diris la maljusta juĝisto. Nu, ĉu Dio ne faros laŭ justeco por siaj elektitoj, kiuj tage kaj nokte (esprimo de la psalmoj por la lamento de la subprematoj) vokas Lin? Ĉu Li longe atendigos ilin? Mi diras al vi: Rapide Li agos por ili laŭ justeco!*"

Jen do tio, kion Jesuo garantias: tiu projekto de Dio por la homaro, la regno, la anstataŭa socio, kie la falsajn valorojn (posedon, ordonemon, elstaremon) anstataŭas la ĝustaj, tiuj kreantaj fratecon (kunpartigo, subiĝemo, servado). Estas tio la regno de Dio: la anstataŭa socio. Jesuo certigas, ke tio realiĝas. La kondiĉo estas, ke la disĉiploj kunhelpu, disiĝante de la valoroj falsaj de la socio. Se tion ili ne faras, tiu regno ne estas realigebla.

Sed la fina konkludo aspektas neplaĉa: "*Tamen, kiam venos la Filo de la Homo, ĉu Li trovos ankoraŭ kredon sur la tero?*" Kion signifas tio? La filo de la Homo estas ankoraŭ Jesuo. Lia veno estos anoncita samtempe kun la detruo de Jerusalemo. Sed la disĉiploj, malgraŭ la instruado de Jesuo, ankoraŭ vizitadas la templon. Jesuo ĝin denunciis kiel detruindan rifuĝejon de ŝtelistoj; sed laŭ la disĉiploj ĝi ankoraŭ estas valorajo: ili ne interrompis la rilatojn kun la pasinteco, la institucio, la povo. Se tiuj rilatoj ne estas rompitaĵoj, la regno de Dio, la socio anstataŭa, ne povas aperi, kaj Jesuo "ne trovos kredon sur la tero".